

# Internacia Fervojisto



Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFEF)  
revuo pri fervojo

ISSN 1397-4270

## 2021.5

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



*Citylink veturilo en Szeged*

## Estimataj gelegantoj

Mi esperas, ke vi dum pasintaj someraj semajnoj sufiĉe refreŝiĝis kaj enĉerpis energion kaj bonan humoron por alvenantaj aŭtunaj monatoj. Kiel vi certe rimarkis, E-komunumo ne somerumis, sed vigle aktivadis. Speciale mi mencias la 2-an Virtualan Kongreson de UEA, kiu okazis en Julio – pri ĝi raportas en la revuo la IFEF-prezidantino. Ĝin partoprenis multaj esperantistoj el multaj partoj de la mondo, pri kio atestas riĉa programo kun multaj prelegoj, kunvenoj, artaj prezentaĵoj kaj ankaŭ babiladoj inter konatuloj. Denove estis konfirmita fakto, ke informadiko, kiel moderna rimedo por komunikado pli kaj pli enpenetras niajn vivojn. Ankaŭ esperantistoj al kutimiĝas al tiu ĉi fenomeno, kiu verŝajne en estonteco havos pli grandan spacon en ilia agado.

Aliflanke informadiko ĝenerale trudas sin en hommedion jam multajn jardekojn - en telekomunikado, entreprenoj, bankoj, logistiko, aŭtomatizado, fervoj-sekurigado kaj multaj aliaj medioj. Eble esperantistoj akceptis ĝin iomete malfrue. Sed estas bone, ke ĝi fariĝis kutima rimedo por E-movado, kiu anstataŭigas mankantajn personajn kontaktojn.



Via redaktoro

**Enhavo:**

Protokolo pri publika komitatkunsido.....	84
IFEF en la 2-a Virtuala Universala Kongreso .....	92
Nova tasko por la Laborgrupo pri historio .....	93
Evoluo de la trajnaj vojaĝeblecoj en unu jarcento .....	94
La Eŭropa jaro de fervojo .....	96
Hungario enkondukas tram-trajnon .....	99
Amuza anguleto.....	100

Titolpaĝo: *Citylink* veturilo por tram-trajna linio en *Szeged*, fonto: *Wikimedia*

**Internacia Fervojisto**

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

**Estraro de IFEF**

**Prezidantino:** Rodica Todor (Rumanio) rodica\_todor@yahoo.com

**Sekretario:** Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

**Kasisto:** Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

**Redaktoro:** Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko) kovar.lad@email.cz

**Gvidanto de la Faka Komisiono:** momente neokupita

**Membroj de la Redaktora Komisiono**

Lene Niemann (Danio), Guido Brandenburg (Germanio), István Gulyás (Hungario), Zlatko Hinšt (Kroatio), Laurent Vignaud (Francio)

**Membroj de la Faka Komisiono**

Guido Brandenburg (Germanio), guido.brandenburg@t-online.de

Jaroslav Matuška (Ĉeĥa Respubliko), Jaroslav.Matuska@upce.cz

**Bank-Konto:**

**Nomo:** „Laurent Vignaud”

**IBAN:** FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

**BIC:** PSSTFRPPNTE

**UEA-konto:** iffk-o

**Retejo:** www.ifef.net

**Facebook:** <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>

# I . F . E . F

## Sekretariejo



### **PROKOKOLO PRI LA PUBLIKA KOMITATKUNSIDO** (plenkunsido) en la 72-a IFEF-kongreso Virtuala (per GEFA-organizado) 23.05.2021

Mallongigoj: Pr = prezidanto, Sk = sekretario, Ks = kasisto, Rd = redaktoro, e-o = estraro, Ĉk = ĉefkomitatano, anst Ĉk = anstataŭanto de Ĉk, IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka Komisiono, TS = Terminara Sekcio, FAS = Fake Aplika Sekcio, Gv = gvidanto de FK, k-o = komitato, k-ano = komitatano, kk-ano = kromkomitatano, k-go = kolego, Hm = honora membro, Hp = honora prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j), (landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO 3166).

**La kongreso sub nomo de Transponta Kongreso „TRAKO” ne povis okazi en Frankfurt/O (DE) kaj Słubice (PL) pro la pandemio de koronaviruso. La LKK de GEA, PEA kaj GEFA organizis ĝin rete. La programo bone disvolviĝis same kiel en ĉeesta kongreso. Por permesi al la k-o voĉdoni, ĉiuj raportoj estis sendataj antaŭe al la komitatoj kaj reprezentantoj de l.a. kaj aperis en Internacia Fervojisto.**

#### **1. Malfermo, konstato de la mandatoj**

La Pr-ino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.

Ĉeestas la estraranoj:

Pr-ino	Rodica TODOR	(RO)
Sk	Vito TORNILLO	(IT)
Ks	Laurent VIGNAUD	(FR)
Rd	Ladislav KOVÁŘ	(CZ)
FK	Jan U. NIEMANN	(DK)
Ĉk	Zlatko HINŠT	(HR)

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

	Lando	Kodo	Komitatano	
01	Aŭstrio	AT	Ernst QUIETENSKY	
02	Belgio	BE	Marc CUFFEZ	
03	Bulgario	BG	Veselka KAMBUROVA	
04	Ĉeĥio	CZ	Ladislav HAKL	
05	Ĉinio	CN	Lihua WANG	neniu

06	Francio	FR	Christian DARDENNE	
07	Germanio	DE	Bodo EHRlich	
08		DE	Andreas DIEMEL	
09	Hispanio	ES	Angel ARQUILLOS PEREZ	
10	Hungario	HU	István GULYÁS (Hm)	
11	Italio	IT	Vito TORNILLO	
12	Kroatio	HR	Zlatko HINŠT	
13	Kubo	CU	(ne rajtas)	neniu
14	Pollando	PL	(ne rajtas) Wiesław LIBNER	
15	Rumanio	RO	Rodica GIUHAT	
16	Slovenio	SL	Jovan MIRKOVIČ	neniu
	ĈEESTO DE	12 l.a.	rajtas 12 komitatanoj	

## 2. Ricevitaj mesaĝoj.

Mesaĝoj ne venis.

## 3. Honorigo al la mortintoj

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 71-a IFK-Malago 2019 ĝis la 72-a IFK-virtuala 2021. Oni honorigas ilin per unuminuta silento; ili ripozu pace.

Lando	Antaŭ nomo	Familia nomo	Naskdato	Mortdato	Aĝo	Menciindaĵo
Aŭstrio	Johann	BAYER	29.07.1926	2019	93	
Aŭstrio	Margarete	GÖSSL	24.06.1943	14.07.2019	76	
Aŭstrio	Hilda	RAUSCHER	28.07.1925	2018	93	
Aŭstrio	Franz	SCHARF	10.11.1928	02.05.2021	92	LKK-sekretario de la 46-a IFK en Krens 1994
Belgio	Lucien	DE SUTTER	08.09.1924	17.02.2021	96	Prezidanto de BEFA, Honora membro de IFEF
Ĉeĥio	Jiří	VENCL	28.02.1936	31.1.2020	83	
Ĉeĥio	Ivo	LANÍČEK	24.09.1937	21.01.2021	83	Eksa direktoro de sekuriga kaj komunikada oficejo de ĈSD, funkciulo de FISAIC
Danio	Erik Verner	MORTENSEN	24.06.1925	18.11.2019	94	
Danio	Karen Katrine	OLSEN	29.11.1929	26.03.2020	90	
Francio	Monique	GRALL	05.1.1.1955	03.05.2020	64	IFEF kontrevizorino kaj FFEA redaktorino

Germanio	Fritz	LAUTENBACH	05.03.1925	12.02.2020	94	Ĉeforganizanto de IFK 1967 Fulda
Hispanio	Rafael	PEREZ SOLAS	1932	25.06.2020	88	
Hungario	Imre	DOMOKOS	19.05.1930	14.07.2019	89	Deputito de la landa asocio
Kroatio	Anka	ŠPEHAR-ŠANTOLIČ	16.12.1929	25.02.2019	89	KFEA sekretario
Italio	Pasquale	CECI	14.07.1927	24.12.2020	93	Organizanto de IFK Rimini 1970 kaj Romo 1978. Membro de la IFEF-„Honora Patrona Komitato”. LKK-ano de IFK Cervia 1993. IFEA – Prezidanto (1995-2010)
Italio	Antonio	DE SALVO	08.06.1942	21.03.2021	78	LKK-ano IFK Rimini 1970 kaj Romo 1978
Italio	Delvina	GIMELLI - STANGHELLINI	27.09.1922	08.01.2021	98	
Italio	Lucia	BOSCHIN - ZANIOL	29.03.1932	03.08.2020	88	

## 4. Estraranaj raportoj

### 4.1. Sekretario

La Sk legas resuman raporton. La raporto aperis en IF 2021-3. Neniu demando, nek rimarko.

Raporto aprobita.

### 4.2. Redaktoro

La Rd resumas la raporton kiu aperis en IF 2021-2. Informas ke la eldono kaj sendado de la bultenoj estis regule faritaj. En la jaro 2020 aperis entute ses numeroj de la revuo Internacia Fervojisto kun entute 128 paĝoj kaj 71 artikoloj aŭ raportoj, sciigoj ktp.

Je la enhavo de pasintjara kolekto de la Internacia Fervojisto partoprenis 19 aŭtoroj.

Raporto aprobita.

### 4.3. Kasisto

La Ks prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj la kasistan raporton kiuj aperis en IF 2021-2.

Raporto aprobita.

## 5. Diskuto kasraporto-bilanco 2020/buĝeto 2022, kotizkonfirmo

Estas konfirmitaj la du membrokotizoj: 9 eŭroj por reta sendo de la

revuo, kaj 15 eŭroj por papera sendo de la revuo. Kotizo aprobata.

## **6. Protokolo de la reta komitatkunsido 2020**

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolojn, ili aperis ankaŭ en IF. Unuanime aprobataj.

## **7. Raporto de la ĉefkomitatano**

La Ĉk legas la raporton. La Ĉk plendas pro malfruo de sendo de la jarraportoj de l.a., pri kiuj al kelkaj li devis instigi plurfoje, sensukcese. Neniu komento. Raporto aprobata.

## **8. Resumo de la jarraportoj 2020 el la landaj asocioj**

La Sk resumas la raporton, ĝi aperos en nia revuo "Internacia Fervojisto" n-ro 2021.6. Pro la fakto ke kelkaj l.a. ne raportis akurate laŭ la demandilo sendita de la Ĉk, kelkaj statistikoj ne reprezentas precize la IFEF-situacion. Oni referos la statistikon kiel eble baldaŭ. Raporto aprobata.

## **9. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)**

### **9.1. Gvidanto**

La Gv Jan NIEMANN resumis agadon de la Faka Komisiono, la retajn prelegojn organizitajn dum la diversaj aranĝoj. Krome li informis pri la rezulto de la diskutoj dum la kunsido de la faka komisiono.

Raporto aprobata.

### **9.2. Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)**

En la jaro 2020 estis preparita la 29-a numero de FFK kun 5 artikoloj de 7 aŭtoroj el 4 landoj.

Post rezigno de L. KOVÁŘ je la posteno de sekretario de Fake-Aplika Komisiono (pro transpreno de la tasko de IF-redaktoro) en Majo 2020 estis elektita en tiu ĉi postenon Jaroslav MATUŠKA.

Pro la koronavirusa pandemio ne okazis multaj jarkunvenoj de l.a., ekskursoj, foiroj ktp.

FK organizis du virtualajn retkunvenojn (en Junio kaj Novembro 2020) kun prezentado de 6 fakprelegoj.

Kelkaj de niaj membroj (kun siaj prelegoj) rete partoprenis la 2-an virtualan UK.

En Septembro okazis Tago de fervojo en Prago, kie estis prezentata ĈFEA, IFEF kaj Esperanto ĝenerale per ekspozicio pri la agado de FISAIC kaj ĈFEA.

Raporto aprobata.

### **9.3. Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)**

La raporto aperis en IF 2021.2. La Sk de TS, Guido BRANDENBURG komentas pri la situacio de TS. Post bona sperto de la reta kunveno li opinias ke: “Eble la Terminara Kuriero ne plu estas taŭga rimedo por kumuli niajn konojn. Eble diskuto en retkonferenco estus pli konvena. Ĝi similus la kunvenojn de la TS enkadre de la Internacia Fervojista Kongreso. IFEF eksperimentas per Zoom (...).”

Raporto aprobata

## **10. Raportoj de la komisiitoj**

### **10.1. Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA**

La IFEF-Pr-ino Rodica TODOR prezentas raporton pri sia posteno ĉe UEA kaj klarigas pri la taskoj kaj la ĝis nun farita laboro de la UEA-komitato, ĉefe pri la oftaj rilatoj inter la K-anoj kaj la ampleksaj retaj diskutoj. Ŝi mencias la ĉeeston dum la virtuala UK kaj la novajn kontaktojn kun elstaraj esperantistoj kiuj respondecas pri diversaj fakoj kaj povus esti kunlaborantoj pri venontaj projektoj kune kun IFEF.

“Ĝuste nun, kiam ni alfrontas la limigojn de la fizikaj renkontiĝoj, ni devas resti fidelaj al niaj komunaj valoroj: kunvivado, intergeneraciaj interŝanĝoj, engaĝiĝo, solidareco. Kaj ĉefe trovi rimedojn, kiuj servas al IFEF por evolui kaj plifortiĝi pere de siaj fakaj kaj kulturaj aktivecoj. Unu el tiuj rimedoj estas partopreni konkretajn interfakajn projektojn... kaj tio estas la strategio de nia federacio por la sekvontaj jaroj.”

### **10.2. Fakdelegitoj ĉe UEA**

La posteno aperas nur surpapere, fakte UEA ne prizorgas rekte pri la delegitoj. IFEF proponas al UEA ke IFEF estu la referenca asocio pri fervoja fako.

### **10.3. Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF**

FISAIC: bonaj rilatoj, IFEF estas membro de FISAIC kaj la reprezentanto partoprenas regule la kunsidojn.

La FISAIC Sk, NIEMANN, demisiis, la nova Sk ne plu sendas informojn kaj protokolojn en Esperanto.

SAT: interrilatoj de membroj de ambaŭ asocioj. Interŝanĝo de la bultenoj.



ILEI: kun ĝi estas bonaj rilatoj, membroj de ILEI partoprenas la kongreson kaj prizorgas pri la E-kursoj. Kunlaboro pere de Kristin TYTGAT kaj Luigia OBERRAUCH ankaŭ por la venonta projekto „Erasmus+“.

UMEA: personaj kontaktoj de la du prezidantoj, interŝanĝo de publikaĵoj.

ISAE: ene de la asocio estas problemoj pri agado, tamen IFEF partoprenis IRIS, retaj prelegoj organizataj de ISAE kadre de TEJO-festivalo „Retoso“.

TAKE: bonaj rilatoj, ili ĉiujare ofertas fakan broŝuron pri konstruado. André GROSSMAN partoprenis la virtualan plenkunsidon kaj konfirmis la interrilaton, invitis la IFEF-membrojn viziti la retpaĝon de TAKE por elŝuti la bultenojn pri konstruado.

IKEF: la Pr Ĉielismo ĉiam informas pri la agado en diversaj kampoj, li prelegis dum la IFK kaj estis proponita de ĈEL kiel referenculo de ĈFEA por IFEF.

### **11.1. Elektoj**

#### **11.1.a. Konfirmo de komitato pri elekto de Gvidanto ene de FK**

Dum la kunveno de la Faka Komisiono okazis la balotoj pri la postenoj ene de FK mem.

Post demisio de la Gv Jan NIEMANN neniu sin proponis por ĉi tiu posteno, do la posteno restos vaka ĝis kiam venos propono de l.a. aŭ alia kolego disponebla, same restos vaka la koncerna posteno de Gv en la estraro. La komitato konfirmas la decidon.

Pro la plurjardeka agado, kadre de FK kaj IFEF, la estraro de IFEF decidis honorigi Jan NIEMANN per diplomo de Honora Membreco de IFEF. Ĝi estis montrata sur ekrano, la originalo estos enmanen donata dum la unua fizika renkontiĝo. Dankon al Jan pro lia grava laboro en IFEF.

#### **11.1.b. Konfirmo de la komitato pri elekto de la sekretarioj ene de FK**

Pri la du postenoj en FK, TS kaj FAS, la faka komisiono reelektis la sekretariojn, Guido BRANDENBURG pri TS kaj Jaroslav MATUŠKA pri FAS. La komitato konfirmas la decidon.

### **11.2. Kongresproponoj ... neniu**

### **11.3. Elekto de la Ĉefkomitatano kaj Anstataŭanto de Ĉk**

La Sk disponigis al la k-anoj voĉdonilon por elekti la kandidatojn de la du postenoj, ĝi estis sendita kun ĉiuj dokumentoj de la plenkunsido. 12 k-anoj resendis ĝin kaj unuanime voĉdonis POR la du kandidatojn. Por la venonta trijara oficperiodo agados kiel Ĉk Zlatko HINŠT kaj anst Ĉk Ladislav HAKL. Aplauĉo, sen bruo, de la ĉeestantoj kiuj aprobis la decidon.

**12. Analizo pri la nuna situacio kaj la estonto de IFEF** (prokrastita dum la Movada Forumo, lundon matene 24.05.2021, 11.00-12.00)

#### **12.1. Raportoj de la laborgrupoj**

La respondeculoj de laborgrupoj ne sendis raportojn, sed dum la kunveno ili resume informis pri la agado de la grupo, kiu ĝenerale ne estas kontentiga.

#### **12.2. Strategia laborplano**

Pri la strategio de IFEF por la jaroj 2021-2023, la Pr-ino prezentis detalan programon pridiskutitan kun la agentejo Kosmo pri la EU-projekto „Erasmus+” kies temo estas „Daŭripova evoluo kaj transporto”. Ĝi postulas kunlaboradon de pluraj E-asocioj kun kunordigado de UEA-TEJO. Ĝi povus esti bona okazo por kunlabori kadre de UEA kaj havi rilatojn kun la junuloj de TEJO. La projekto estus financata de EU, sed kaze ke ne ĉiuj programeroj estos aprobitaj, IFEF memstare subvencios la realigadon de la neaprobitaj eroj en la projekto.

#### **12.3. Situacio en kelkaj landoj**

Fine de la jaro 2020 la Dana landa asocio estingiĝis.

El Kubo ni ne havis reagojn kaj informojn, ĉu ankoraŭ ili intencos resti IFEF-membroj, kvankam la membro-kotizoj ĉiam estis donacitaj de kelkaj niaj membroj.

El Ĉinio la informoj venas de tempo al tempo. La nuna prezidanto informas ke li estas tre okupita pri sia laboro kaj pro tio delegis la interrilatojn al nia amiko Ĉielismo. Aliajn rilatojn oni konsilas havi kun ĈEL; por la jaro 2021 ĈFEA ankoraŭ ne pagis la membro-kotizon.

En Pollando, post grava laboro pri la kontaktoj kun la Universitato en Poznano kaj la Asocio de teknikistoj, la interrilatoj iĝis maloftaj. La prezidanto de pola asocio informis ke li havas multajn okupojn en la

laborejo. Por la jaro 2020 ne estis pagita la membro-kotizo. Sed oni promesis baldaŭ pagi la mankantajn du jarkotizojn.

En la aliaj landoj la situacio estas sufiĉe stabila krom ioma malkresko de la membraro.

### **13. Venontaj kongresoj**

#### **13.1. Konfirmo de la invito al la 73-a IFK en 2022 en Ĉeĥio.**

ĈeFEA invitis IFEF kongresi en Beroun. Ili prezentis la urbon de la kongreso per bildoj kaj filmo, la programon provizoran kaj ĉiujn informojn utilajn, bedaŭrinde mankas la prezoj de la hoteloj ĉar pro la pandemio oni devos revizii la ĝisnunajn prezojn. Estis prezentata ankaŭ la postkongresa urbo Pardubice.

#### **13.2. Elekto de la lando por la 74-a IFK en 2023, Belgio**

BAFE invitis IFEF kongresi en Belgio en la jaro 2023. Ili jam esploris diversajn eblecojn. La plej ebla loko povus esti la urbo Leuven (Loveno).

#### **13.3. Propono pri la jaro 2024, Serbio**

Fervojista Esperanto-Societo en Niŝ, Serbio, pretas kaj proponas sin organizi en Serbio la kongreson de IFEF en la jaro 2024. La societo estas oficiale registrita organizaĵo de esperantistaj fervojistoj.

#### **13.4. Propono pri la jaro 2025, Slovakio**

La Pr-ino havis kontaktojn kun slovaka organizinto de la UK en Nitra pri ebla okazigo de IFK en Slovakio. Li konsentas organizi IFK-n en la jaro 2025 kun helpo de nia IM Magdaléna Feifičová kaj ĉeĥaj IFEF-membroj.

### **14. Eventualaĵoj**

Pro la dujara organiza laboro de la kongreso, unue planita ĉeeste kaj pro la pandemio okazinta rete, oni transdonas al k-go Guido BRANDENBURG honoran diplomon de IFEF.

Pro la grava kunlaboro en redaktora komisiono kaj la plurjardeka agado flanke de Jan, oni transdonas al s-ino Lene NIEMANN honoran diplomon de IFEF.

Ili estis montrataj sur ekrano, la originaloj estos enmanen donataj dum la unua fizika renkontiĝo.

### **15. Libera diskutado**

Nenio. Manke de aliaj intervenoj, la Pr-ino fermas la kunsidon.

**La sekretario Vito Tornillo**

**Monte San Pietro, 24.05.2021**

## IFEF en la 2-a Virtuala Universala Kongreso (VK) de Esperanto, Julio 2021



“Paco kaj konfido: universalaj valoroj”

VK okazis ĉijare inter la 17-a kaj la 24-a de Julio. Pli ol 70 asocioj kaj grupoj aliĝis al ĝi kaj entute estis pli ol 160 virtualaj budoj.

Kiel kutime dum UK, IFEF havis spacojn en Virtuala Movada Foiro (ViMF) kaj por fervojistaj kunvenoj.

### 7 babilĉambroj

Dum la tuta semajno IFEF ricevis 7 horojn en babilĉambroj por faciligi la renkontiĝojn inter la aliĝintoj (fervojistoj sed ankaŭ aliaj interesatoj pri fervojo). Kelkdekoj da IFEF-membroj aliĝis kaj pluraj aliaj personoj vizitis la virtualajn “ĉambroj”. 2 el tiuj babilejoj okazis ege frue matene (laŭ UTC horzono) kaj ilin ĉeestis 9 interesitoj el Japanio, Ĉinio, Ĉilio kaj Meksiko. La aliaj 5 havis 78 gastojn el 19 landoj (Aŭstrio, Barato, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hispanio, Israelo, Italio, Kanado, Kroatio, R.D. Kongo, Norvegio, Rumanio, Rusio, Serbio, Slovakio, Slovenio, Tanzanio).

En la Fervojistaj kontaktkunvenoj ni ne nur prezentis al la ĉeestantaj fervojistoj aŭ amikoj de fervojo kelkajn interesajn prelegojn sed ankaŭ informis la publikon pri nia asocio.

Kadre de la du komitatkunsidoj, la prezidantino reprezentis IFEF kaj voĉdonis la raportojn prezentitajn de la UEA-estraro kaj ankaŭ pri la propono de prof. Marco Lucchesi kiel nova membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

### IFEF-programo dum la VK 2021

Dum la Virtuala Kongreso niaj membroj aktive partoprenis diversajn retkunvenojn kaj babiladojn. Sufiĉe nombran intereson de VK-partoprenantoj altiris prelegoj de R. Todor pri IFEF, L. Kovář pri la venontjara kongreso en Ĉeĥio, J. Matuška (prelegis L. Hakl) pri translima trafiko inter Pollando kaj Ĉeĥio, Z. Hinšt pri sociologo Max Weber, A. Diemel pri renesanco de noktaj trajnoj kaj L. Kovář pri komponisto A. Dvořák.

**Rodica TODOR**

## Nova tasko por la Laborgrupo pri historio?



Per la eldonoj de Manlibro pri Arkivado kaj Historia Suplemento 1999-2019 oni povus pensi, ke la Laborgrupo pri Historio kaj Arkivado solvis sian taskon. SED, kiel mi diris dum la kunveno dum la 72-a IFK 24-an de Majo historio estas jam tio, kio okazis antaŭ kvin minutoj.

Ni multe parolis dum la lastpasintaj jaroj pri la malkontentiga situacio de IFEF rilate al membronombro. Ni multe ploras pro la pandemio, kaj dum jardekoj ni ploras pro la privatigo de fervojoj, ke ĝi estas la „malamiko” ... sed ĉu vere nur tiel estas?

Dum la kunveno 24-an de Majo iu diris, ke ne sufiĉas rigardi nin mem kaj kompari nin kun nur aliaj esperanto-grupoj ... Se ni ne estus sciintaj tion antaŭe, la pandemio montris al ni, ke ni ne estas solaj. Por vere kompreni kaj scii, kio okazas, ni bezonas statistikan materialon „de ekstere”.

Ni devas scii pri la evoluo de fervojoj en diversaj landoj, kaj same pri la evoluo ĝenerale en diversaj landoj por vere povi kompari kaj eble trovi klarigojn kaj solvojn ... kiuj faktoroj kunludas? Malneta nacia produkto, vivnivelo - kio pli? Ne helpas skoldi unu la alian – ni devas kompreni,

kio influas al la evoluo ĉe nia eta angulo, se kelkaj landoj ĝenerale elturniĝas pli bone ol aliaj.

### **Estas tasko por nia grupo!**

Post kelkaj jaroj tia statistiko povus rakonti pri ankaŭ aliaj aferoj. Ĉu homoj „pensas medi-kongrue”, kaj – pro nia interesosfero kiel fervojistoj – ĉu okazos klara kresko de „fervoj-konsumado” ... ĉu homoj iras de aviadil- al fervojtransporto?

Materialo statistika bone ellaborita post profunda esplorado povas montri/pruvi, ĉu la fervojo „agas pli verde” ... ĉu la homoj nun konscias, ke oni DEVAS agi pli medi-kongrue – ĉu la pandemio kaj la Greta Thunberg-efiko igis homojn ŝanĝi vere la pensmanieron.

Mi petas al vi, kiuj havas kontaktojn/eblecojn, havigi al la Laborgrupo pri historio kiel eble plej multajn datumojn ... ne bezonas esti kun multaj detaloj. Se en via lando troviĝas pli da fervojentreprenoj, eĉ multaj, prenu datumojn nur de la plej grandaj/signifaj – temas pri la ĝeneralaj tendencoj.

Ĉiu, kiuj legas tion-ĉi, kaj kiuj havas intereson pri la afero, estas tre bonvena turni sin al mi. Kune ni ellaboros enketilon pri tiu granda temo, kaj mi sendos ĝin al landaj asocioj kaj al individuaj membroj, Malpli ol 12 horojn post la dumkongresa kunveno mi ricevis la unuan respondon. Tio montras al mi, ke homoj interesiĝas pri tiu temo ...

**Jan U. Niemann**, niemann(ĉe)kabelmail.dk, WhatsApp +45 71 72 32 42

Respondeculo Laborgrupo pri historio kaj arkivado

---

## **Evoluo de la trajnaj vojaĝeblecoj en unu jarcento**

LA VOJAĜO DE ZAMENHOF AL PARIZO EN 1914 KAJ SAMA VOJAĜO EN 2014

En 1995, *Ritzau-Verlag* reeldonis la germanan fervojhoraron (*Reichs-Kursbuch*) de la jaro 1914. Por fervojŝatanto, tre interesa estas la pristudado de la tiamaj eblecoj, kiujn la fervojoj ofertis por vojaĝi tra Eŭropo en tiuj ne tiom foraj tempoj.

Kiel ekzemplo mi prenis la vojaĝon, kiun L.L. Zamenhof eble faris, aŭ almenaŭ povus esti farinta, por partopreni la 10-an Universalan Esperanto-kongreson. Kiel ni ĉiuj scias, tiu kongreso, al kiu aliĝis 3739 homoj, ne okazis, pro eko de la mondmilito. Zamenhof komencis la vojaĝon, sed estis haltigita en Kolonjo, kaj devis reveturi al Varsovio; ĉar


ankaŭ la rusa landlimo estis fermita, li nur reatingis sian hejmon per tre komplika vojaĝo. Oni ne scias, kiujn trajnojn li uzis ĝis Kolonjo; ni uzos la studhipotezon, ke li vojaĝis kiel eble plej rapide.

Ni poste pristudos la vojaĝon, kiu nuntempa vojaĝanto farus por la sama celo. Kaj tio en du sencoj. Unue ni vidos, kiel la plej rapida vojaĝo aspektas nun: relative malsimila, pro la konstruo de pluraj novaj linioj. Pli interesas do la dua pristudo: plej rapida ebleco fari precize samitineran vojaĝon nun.

Depost 1914, kompreneble la trajnoj kaj fervojoj spertis multajn teknikajn plibonigojn. Sed ne nur tio ŝanĝiĝis: ankaŭ la politika mapo de Eŭropo, la veturiloj kaj la vojaĝbezonoj. En la jaro 1914, samlonga vojaĝo en distanco konsumis pli da tempo ol nun.


Kiel devis vojaĝi D-ro Zamenhof en Julio 1914, por atingi Parizon el Varsovio kiel eble plej rapide? La pristudo de la horaro de 1914 permesas kalkuli jenan vojaĝon.

En Varsovio Viena stacio, li devis preni trajnon forirantan je la 16:44 h al Toruno. Tie alvenis la trajno je la 22:50 h. Post tri kvaronhora atendo, foriris je la 23:36 h noktotrajno al Berlino Silezia stacio, kie ĝi alvenis je 05:51 h. Malpli ol du horojn poste foriris de Berlino Silezia stacio, je la 07:44 h, la trajno al Parizo; ĝi alvenis en Parizo Norda stacio je la 00:30 h. La tuta veturo daŭris do 31 horojn kaj 46 minutojn. Oni devas aldoni, ke la horoj ne samis en preskaŭ tuta Eŭropo kiel nun: la plej okcidenta parto de tiama cara Rusio, al kiu apartenis Varsovio, estis 1:01 horon antaŭ Germanio, kaj Belgio kaj Francio estis unu horon post ĝi. Tial, oficiale Zamenhof foriris je 17:45 h el Varsovio Viena, kaj alvenis je 23:30 h en



Parizo Norda. Dum la vojaĝo, li devis malantaŭenŝovi la montrilojn de sia brakhorloĝo (en tiu tempo pli verŝajne poŝhor-loĝo) de 2:01 h.

Kiel li vojaĝus hodiaŭ? Preskaŭ certe aviadile, kaj tio ne kostas pli ol trajne, se li sukcesis rezervi sufiĉe frue. Sed tio ne estas respondo, ĉar ni volas pristudi la fervojajn eblecojn.




Inter Varsovio kaj Berlino veturas, plurfoje tage, *Warszawa-Berlin-Express*. De Berlino al Kolonjo veturas ĉiuhore eksprestrajnoj *Inter-city Express* (linio 10). Kaj de Kolonjo al

Parizo veturas, plurfoje tage, internaciaj eksprestrajnoj *Thalys*.

Plej efika vojaĝo jenas: Varsovio Centra stacio 05:55 h – Berlino Orienta stacio 11:06 h / 11:35 h – Kolonjo Ĉefa stacio 16:09 h / 16:42 h – Parizo Norda stacio 19:59 h. La tuta vojaĝo daŭras do 14 horojn kaj 4 minutojn, tio estas malpli ol duono de la tempo de 1914. Oni povas komplete fari ĝin dumtage, noktotrājno ne plu necesas.

**François Vilhelm**, bildoj: fotoilustraĵoj

## La Eŭropa jaro de fervojo – „*The Connecting Europe Express*”



Kadre de la Eŭropa Jaro de Fervojo, speciala EU-trājno trairos la kontinenton de la 2-a de Septembro ĝis la 7-a de Oktobro 2021, haltante en pli ol 100 urboj en 26 landoj:



Temas pri „*Connecting Europe Express*” – „Eksprestrajno Konektanta Eŭropon”.

Faktoj kaj ciferoj pri „*Connecting Europe Express*”:

- 36 taga veturado forlasante Lisbonon la 2-an de Septembro alvenante en Parizo la 7-an de Oktobro;
- 3 diversŝpuraj trajnoj funkciigitaj de fervojaj kompanioj el diversaj EU-membroŝtatoj;
- 26 landoj tra Eŭropo kun pli ol 100 haltoj;
- 20 000 kilometroj da vojaĝo montranta la unuigan forton de fervojo;
- 33 limtransirejoj ligantaj landojn, entreprenojn kaj homojn;
- 40 partneroj, kiuj ebligis la projekton;
- 26 landoj en 36 tagoj.

Elpensita de la Eŭropa Komisiono kadre de la Eŭropa Jaro de Fervojo, kaj ebligita per senprecedenca industria kunlaboro, „*Connecting Europe Express*” transiros la kontinenton ĉi-aŭtune. La speciala trajno montros - en reala tempo - la potencon de fervojo ligi homojn kaj entreprenojn, kaj la gravecon de la EU-infrastruktura politiko por ebligi tion.

La itinero estis anoncata la 9-an de Majo, en la Tago de Eŭropo, ĉar Eŭropo festas ĉi-jare pacon, unuecon kaj la ligojn konstruitajn tra la jaroj: kulturajn, ekonomiajn kaj fizikajn. „*Connecting Europe Express*” povos esplori multajn el tiuj fizikaj ligoj. Komencante sian vojaĝon la 2-an de Septembro en Lisbono kaj haltante en pli ol 70 urboj en 26 landoj, la trajno ligos la portugalajn, slovenajn kaj francajn prezidantecojn de la Konsilio de EU, alvenante al Parizo la 7-an de Oktobro.

Komisaro pri Transporto, Adina Vălean (RO), diris: "Trakrucante la kontinenton, de Lisbono al Bukareŝto kaj de Berlino al Parizo, „*Connecting Europe Express*” sekvos itinerojn, kiuj ligas nin kune - ĉu kiel landoj, kompanioj aŭ homoj. Krom simbolo por konektebleco, ĉi tiu trajno ankaŭ memorigas, ke ni ankoraŭ havas longan vojon antaŭ ni kaj multe da laboro ĝis la fervojo fariĝos la preferata transportilo por eŭropanoj."

La projekto estas unika klopodo, kiu partoprenigas la Eŭropan Komisionon kaj la Komunumon de Eŭropaj Fervojaj kaj Infrastrukturaj Kompanioj (CER), eŭropajn fervojajn disponantojn, infrastrukturajn administrantojn kaj multajn aliajn partnerojn ĉe EU kaj loka nivelo.

Andreas Matthä, Prezidanto de CER kaj de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj, emfazis: "Vojaĝante tra 26 eŭropaj landoj, „*Connecting Europe Express*” pruvas la gravecon de la Eŭropa Fervojo. Por atingi niajn klimatajn celojn, ni devas plifortigi la vigecon de fervojo per pli internaciaj longdistancaj pasaĝeraj fervojaj servoj kaj ni devas ankaŭ konsekvence direkti la varan transporton al fervojo. "

Memoriga pri la manko de kunfunkciebleco inter partoj de la fervoja reto de Eŭropo, la „Eksprestrajno Konektanta Eŭropon” inkluzivos, fakte, tri malsamajn trajnojn, kiuj taŭgas por la malsamaj ŝpuroj uzataj en Eŭropo. Sed ĝi ankaŭ montros la tre bonan kunlaboron inter fervojaj entreprenoj kaj administrantoj de infrastrukturo.

La trajno funkcianta per la normala ŝpuro havos ses vagonojn. Du prezentos moveblajn ekspoziciojn pri diversaj teknologioj kaj novigoj pri fervojo kaj pri kiel la EU subtenas infrastrukturajn projektojn. Kvar vagonoj por konferenci, sidi, manĝi kaj dormi kompletigos la trajnon.

Aparta trajno veturos per la ibera ŝpuro en Portugalio kaj Hispanio, kaj la tria per la balta relŝpuro en Estonio, Latvio kaj Litovio. Ambaŭ trajnoj laŭ la itinero renkontiĝos kun la normalŝpura trajno.

Kvin konferencoj jam estas konfirmitaj kaj okazos en diversaj urboj invitante al diskuto kaj debato pri la ambiciaj celoj kaj agadplanoj por fervojo skizitaj en la Strategio pri Daŭripova kaj Inteligenta Moviĝeblo de EU. La konferencoj temas pri EU-infrastruktura politiko, kaj reliefigos la rolon de la Transeŭropa Reto pri Transporto (TEN-T) por konekti ne nur Eŭropon, sed ankaŭ transporton.

Ĉe haltoj, eventoj kaj aliaj agadoj, adaptitaj al lokaj infektoprotektaj kondiĉoj, prilumos la ŝlosilan rolon, kiun fervojo ludas por nia socio, sed ankaŭ la defiojn, kiujn fervojo ankoraŭ devas superi por altiri pli da pasaĝeroj kaj varoj.

Bonvenigu la „ Eksprestrajno Konektanta Eŭropon”, ĉar ĝi haltas ĉe stacio proksime al vi kaj aliĝu al la okazontaj eventoj.


**Rodica TODOR**

## Hungario enkondukas tram-trajnon

Urbo *Szeged* en suda Hungario kun siaj 163 000 loĝantoj povas fieri pri kvar tramlinioj kaj ses trolebuslinioj. Nun ĝi aldonas unuan projekton de tram-trajnoj en la lando, informas Benjámin Zelki.

### Interurba tram-trajno

Post plibonigo de urba publika transporto en *Szeged* la urbo nun preparas pli ambician projekton de disvolvo de 25 km longa tramlinio kiu kunligas du ĉefajn urbcentrojn en distrikto *Csongrád – Szeged* kaj *Hódmezővásárhely*.



El historiaj motivoj loĝantaro de Hungara ebenaĵo koncentriĝis prefere en relative malgranda nombro de pli grandaj komunumoj ol disvolviĝi en malgrandaj vilaĝoj. En la jaro 1910 *Szeged* jam havis 118000 loĝantojn kaj *Hódmezővásárhely* 62000. Dum jaroj *Szeged* disvastiĝis, sed ankaŭ ĝia najbaro havis proksimume 43000 loĝantojn. Ŝanĝiĝis ankaŭ dungitmodeloj. Tio signifas, ke nun regule ĉiutage alveturadas al

Szeged 6000 ĝis 8000 personoj.

Publika transporto certigas proksimume 60 procentojn de transporto inter ambaŭ urboj per busoj kaj trajnoj. Konsidere, ke ĉefaj stacidomoj en ambaŭ urboj troviĝas relative malproksime de la centraj areoj, proksimume 90 procentoj de transportuzantoj vojaĝas per busoj. Hodiaŭ veturas en ambaŭ direktoj pli ol 80 busoj, kiuj kunligas ambaŭ urbojn dum pinthoroj. Konstruo de tramlinio planas superi relativan izoligon de stacioj kaj transmeti la plej grandan parton de tiu ĉi transporto al fervojo. La kompletajn kostojn oni taksas je 74 ĝis 76 miliardoj da hungaraj forintoj, el kiuj 22 miliardoj venas de EU kaj restaĵo de hungara ŝtato.

### Progresas realigo

La laboroj je projekto de tram-trajnoj komenciĝis en Aprilo 2018. La konstruado estas dividita en kvar partoj. Laboroj en sumo de 9 miliardoj da hungaraj forintoj por instalado de novaj tramlinioj en ambaŭ urboj estis adjudikitaj en Aŭgusto 2017 al lokaj konsorcioj *Strabag Vasútépítő* kaj *Belfry PE Kft*.

Veturilojn liveras *Stadler*-entrepreno en Valencio laŭ kontrakto el Novembro 2017. En kontrakto estas ok hibridaj elektrodizelaj veturiloj *Citylink* (vidu titolpaĝon). La veturilo havas kapaciton de 216 vojaĝantoj. Transportoservon certigos ŝtata kompanio *MÁV-Start*. Ĝi estos la unua okazo, kiam hungara nacia fervojkompanio funkciigos tramlinion.

**Ladislav Kovář**, laŭ artikolo de Benjámín Zelki, 1.4.2020, *Metro Report International*

### Amuza anguleto

P	S	S	N	T	A	I	I	T
A	R	L	M	O	S	O	E	I
O	A	L	N	L	R	R	O	T
A	O	Ĝ	E	O	S	N	E	S

Nun simpla tasko: Skribu unuan literon kaj poste ĉiun kvinan ĝis vi elĉerpos ĉiujn. Vi ricevos proverbon.

Preparis Ivan Potiška.

Solve el pasinta numero de IF: AL ĈIU BESTO PLAĈAS ĜIA NESTO